

A detailed oil painting of an elderly man with a long, flowing white beard and hair, looking slightly to the left. He is wearing a dark, heavy robe. His hands are clasped in front of him. The background is dark and indistinct. The overall style is classical and realistic.

Trevor Steele

**Senpaga  
provlibro!**

**Paulus Fondinto**

FEL

Paulus fondinto

# **Paulus fondinto**

**Trevor Steele**

# Paulus fondinto

## Eldono de Flandra Esperanto-Ligo



n-ro 43 en la serio "Stafeto"

Tiu ĉi bitlibro estas senpaga provaĵo kaj  
enhavas nur kelkajn ĉapitrojn de la  
originala verko. Ĝi rajtas esti libere kopiata.

**Por Katja kaj David**

## Kvazaŭ prologo

Kial ni vivas? Kiam la mondo komenciĝis? Se ĝi iam finiĝos, kiam kaj kiel? Ĉu iu dio aŭ dioj kreis la mondon? Se jes, kiam kaj kiamotive?

Plejparte ni modernaj homoj, se ni ne devas dediĉi ĉiun momenton al la lukto trovi panon por ni kaj niaj, levas tiajn demandojn.

Unu maniero respondi al la grandaj demandoj estas serĉi informojn en antikvaj skribaĵoj, kaj probable neniu gento faras tion pli intense ol mia propra, la juda. Kaj certe estas nestovarmo en la konvinkiĝo, ke oni estas membro de grupo, kiu havas specialajn rilatojn al la Kreinto. Domaĝe pri aliaj popoloj, sed Dio devas scii, kial Li aranĝis aferojn tiel.

La problemo pri tia aliro estas, ke se oni vagas en la mondo kaj provas kompreni,

kiel aliaj homoj respondas, la hereditaj respondoj devas ŝajni pridubindaj. Almenaŭ estas tiel en mia kazo.

Unu afero estas certa: ke la mondo daŭre ŝanĝiĝas, ofte post katastrofo. Neniu povas nei, ke nia estas epoko de katastrofoj, almenaŭ se temas pri mia popolo. Kiaj ŝanĝoj venos? Eble tiu ĉi teksto donos indikojn.

Dum la lastaj jaroj mi rikoltis multajn tekstojn, el kiuj mi nun citos du fragmentojn, kiuj parte donas la konturojn de mia skribaĵo.

=\*==\*=

Mi ricevis la suban raporton de Efraim bar Jonas, kristano iam loĝanta en Romo, nun en siria Antioĥio:

*Antaŭ preskaŭ tridek jaroj mi sukcesis viziti Paulus el Tarsos en roma malliberejo la tagon antaŭ ol li malaperis. Lia stato estis mizera. Li diris, ke ŝajnas, ke lia tuta vivo estas vana. Liaj malamikoj sukcesis korupti lian mesaĝon en la komunumoj, kiujn li mem fondis. Kaj nun la monstra Cezaro Nerono intencas ekstermi ĉiujn kristanojn, li diris. Paulus ne komprenis, kial Jeŝu Christos permesas tion. Li aspektis tre maljuna kaj malesperanta.*

*Kaj la postan tagon Paulus kaj eble dudek aliaj kristanoj malaperis, certe trenotaj al kruela morto.*

*Mi decidis kiel eble plej kviete eskapi el Romo kaj reiri al mia hejmloko Antioĥio.*

*==\*==\*==*



Kaj de Jakob bar Ŝimeon, kristano loĝanta en transjordana Pella sed multe vojaĝinta en la Imperio, mi ricevis tiun ĉi plendon antaŭ unu jaro:

*La vera kredo je nia mesio Jeŝu bar Josef perdiĝas. Ĝiaj defendantoj, antaŭ ĉiuj Jakob la justulo kaj Kefas kaj Jonatan, la aŭtentaj apostoloj, jam delonge mortis. Nun la kristanoj volas scii nenion pri nia juda tradicio. Ili ĉiuj glutas la herezajn ideojn de tiu pseŭdo-apostolo, tiu homo nomata Paulus el Tarsos.*

## Prezento de la aŭtoro

Antaŭ eble tridek jaroj mi, Ŝimeon bar Josef, ricevis viziton de Eleazar bar Eleazar, kiu poste sendis al mi sian rakonton pri nia interparolo. Ĉar Eleazar skribis pli bone ol mi – kaj ja iom flate pri mi – mi uzas liajn komentojn kiel prologon. Decas, ke mi donu iuspecan aŭtobiografion. Do bonvolu legi la vortojn de Eleazar.

=\*==\*=

Ŝimeon bar Josef elegante salutis min ĉe la pordo kaj geste invitis min eniri. Tuj mi admiris la fajnajn trajtojn kaj la nete kombitajn grizajn harojn, sed la tempo por observi unu la alian ankoraŭ ne venis. Li koncentriĝis pri sia rolo de gastiganto. La

granda domo, kun bela situo alte super la glore blua Galilea Maro, ŝajnis ankoraŭ iel fremda al li. Li prezentis ĝin al mi ne kun posedanta fiero, sed kvazaŭ li estus iu ĉefa servisto. Mi admire prikomentis tion kaj tion ĉi, kaj tio estis facila rolo, ĉar vere la domo estas impona.

Kiam tiu ceremonio finiĝis, li invitis min sidi ĉe tablo, kie manĝo bele prezentita atendis nin. Li ne imitis la romian kutimon duonkuŝi dum manĝado, kaj mi intuciis, ke pro tio, ke li juĝas pli facile manĝi kaj paroli sidante. Nur fraŭlo de multaj jaroj povus tiel elegante aranĝi manĝotablon. Ial mi sciis, ke li ne havas servistinon aŭ sklavon en la domo.

Antaŭ ol ekmanĝi li fermis la okulojn kaj diris silente iun dankopreĝeton: tion mi neniam antaŭe vidis en Palestino. Dume mi ne povis ne pensi: aha, tiel aspektus Jeŝu, se li estus vivinta sepdek jarojn. Ĉiuj diris, ke Ŝimeon mirinde similas la faman fraton.

Unue ni manĝis kaj parolis pri regionaj manĝaĵoj; kaj li kaj mi vizitis multajn lokojn, kaj ni povis interŝanĝi tiajn informojn. Fine li diris: “Strange, ĉu ne, ke mi pasigis tiom da jaroj kiel malriĉa vaganto kaj nun vivas en riĉula domo.”

“Jes,” mi konsentis. “Ankaŭ mi multe vojaĝis – kiel misiisto – kaj mi estas certa, ke mi neniam posedos ĉi tian domon.”

“Mirjam donacis ĝin al mi.” Li humile gestis, kvazaŭ por diri, ke li kompreneble ne meritas la domon.

“Mirjam? Ĉu la amatino?”

“Jes, *lia* amatino. Ĝis la fino de la vivo ŝi ankoraŭ amis lin kiel viron, malgraŭ la apoteozo, kiun li devis suferi en tiuj rondoj. Kaj mi memorigis ŝin pri li. Ŝi vivis kun la ceteraj en Jerusalemo, sed donis al mi la taskon administri la komercon ĉi tie. La salajro estis multe tro alta. Kaj kiam ŝi eksciis, ke ŝi baldaŭ mortos – kaj ŝi ne havas posteulojn – ŝi heredigis al mi la

komercon kaj la domon. Do la senmona vaganto iĝis la riĉulo de Magdala.”

“Iu diris al mi, ke vi estas la bona riĉulo de Magdala, kiu ĉiam donacas ion al la malriĉuloj.” Ĉar li parolis tiel malkaŝe, mi kuraĝis demandi: “Ĉu vi pripensis ne akcepti la riĉulan rolon?”

“Jes, sed mi decidis gustumi ankaŭ ĉi tian vivon. Mirjam vere volis, ke mi transprenu. Do provizore mi estas ĉi tie. Eble iun tagon mi fordonacos ĉion kaj daŭrigos mian senripozan serĉon al Dio.”

“Pardonu mian malĝentilan demandon, sed kia komerco estas?”

“Fakte la patro de Mirjam fondis ĝin. Li aĉetis specialan fiŝon de la lokaj fiŝistoj – *muries* – preparis laŭ sekreta recepto, kaj vendis al la merkato en Romo. Ĝi estas frandaĵo por la aristokratoj, kaj multekosta. Aktuale mi profitas de la luksamo de la dikaj regantoj en la ĉefurbo. Ne aparte konvena rolo por homo kun miaj ecoj. Kaj

fakte mi faras preskaŭ nenion – la stabo estis bonege elektita kaj trejnita de Mirjam.”

“Ŝimeon, vi respondas kun laŭdinda honesteco al miaj demandoj. Vi scias, ĉu ne, ke mi estas nazoreano, misiisto?”

“Tion mi facile divenus. Sed ĉu nun oni ne nomas vin kristanoj?”

“Jes, en diversaj lokoj, aparte en Antioĥio, oni uzas tiun terminon. En la komenco ni estis simple La Vojo. Kelkaj maljunuloj ankoraŭ plej ŝatas tiun nomon.”

“Nu bone, vi estas nazoreana kristano de La Vojo. Kaj al kio mi ŝuldas vian viziton al tiu ĉi nekredanto?”

“Mia nuna deziro estas verki biografion de Paulus. Vi renkontis lin kelkfoje, ĉu ne?”

“La fanatikulon? Jes, kelkfoje.”

“Min interesas viaj impresoj pri li, ĉu pozitivaj ĉu negativaj.”

“Antaŭ ol paroli pri Paulus, necesas paroli pri mia frato, kies mesaĝon Paulus tiel tordis.”

“Nu jes, tre interesus min aŭskulti vian opinion pri Jeŝu. Oni scias, ke vi estas la sola familiano de Jeŝu, kiu ne aliĝis al la nazoreanoj.”

“Kaj vi volas scii, kial mi estas la esceptulo, ĉu ne? Nu bone, mi amegis mian fraton. Li estis ankaŭ speco de patro por mi: nia patro mortis antaŭ mia naskiĝo, kaj Jeŝu, la unua filo, rolis kiel patro. Mi estis nur knabeto, kiam Jeŝu formetis la rolon de unuenaskito kaj ekiris en la mondon serĉi la rolon, kiun li kredis, ke Dio destinis por li.”

“Esti la Mesio ...”

“Nu, tiu rolo venis nur post multaj jaroj. Vidu, Jeŝu estis mirinda saniganto kaj predikanto, li sanigis homojn kaj feliĉigis ilin, kaj liaj vortoj estis nerezisteble noblaj. Bedaŭrinde li konvinkiĝis, ke Dio elektis lin por la Mesio-rolo, kaj li iris al

Jerusalemo kaj forĵetis sian tiel valoran junan vivon pro ... iluzio! Li povintus fari tiom da bono, redoni vivoĝojon al tiom da suferantoj, li povintus edziĝi al la bela kaj ĉarma Mirjam kaj generi mirindajn infanojn ...”

La voĉo de Ŝimeon perfidis, ke lia doloro pro la perdita frato ne plene cikatriĝis.

Kiel eble plej sent-eme mi diris: “Vi parolas pri iluzio ... sed miloj da homoj nun kredas, ke li vere estas la Mesio. Mi estas unu el tiuj miloj.”

La fajnaj trajtoj alprenis iom polemikan esprimon, kaj dum longa tempo li silentis. Fine li diris, zorge elektante siajn vortojn: “Kiam Jeŝu konfidis al mi, ke li intencas iri de Galileo al Jerusalemo kaj sin oferi kiel Mesion, io en mi diris, ke la tuta obsediĝo pri Mesioj kaj la fino de la mondo estas falsa. Mi rifuzis iri kun li al lia morto ...”



Ĉu Ŝimeon sentis ian kulpon, ke li ne akompanis la amatan fraton-gvidanton ĝisfine? Ĉiukaze li longe silentis, kaj mi ne aŭdacis ion diri.

“Nur poste, kiam mi jam vizitis multajn landojn kaj parolis kun multaj judojj ... kaj mi silente aŭskultis dezertajn ventojn ... kaj la plaŭdadon de noktaj marondoj ... kaj studis la mirindajn stelojn de la firmamento kaj enspiris la freŝan aeron de senhomaj lokoj ... kaj proponis mian laboron kaj mendis manĝon en lingvoj aliaj ol la aramea kaj la greka ... kaj komencis pensi sendepende, eĉ parte ribelis kontraŭ kelkaj ideoj de mia amata frato ... Aĥ, se nur ni judoj lasus freŝajn ventojn forblovi la araneaĵojn de niaj naciaj tradicioj!”

Ŝimeon paŭzis, kaj mi havis la impreson, ke li la unuan fojon envortigas pensojn, kiujn li neniam antaŭe esprimis. “Nur post tiuj spertoj en foraj landoj mi vere konstatis, ke la juda priokupiĝo pri la detruo de tiu ĉi fia mondo kaj la interveno de Mesio, kiu savos la bonajn judojn, estas

ia primitiva triba kredo, rezulto de troa kontemplado de la propra umbiliko.”

“Aĥ, mi ne tute komprenas tiun diron,” mi intervenis.

La mieno de Ŝimeon iom severiĝis. “Neniu alia popolo perdas sian tempon per tiaj obsediĝoj. Kial la mondo estas tiel malbona? Ĉar ni judoj dum jarcentoj vivas en dependeco de aliaj potencoj, kaj estas nenia perspektivo, ke ni havos propran sendependan regnon – do la mondo estas detruenda. Dio mia! Ĉu vere plibonigus la situacion de la malriĉaj judoj, se ni havus judan reĝon anstataŭ la romiaj tiranoj? Ni judoj estas nur unu popolo en granda mondo. Kial la Dio, kiu kreis la Universon, okupiĝu pri ni kaj pereigu la mondon kaj sendu Mesion por komplezi unu genteton?”

“Ho, fortaj vortoj! Ŝimeon, vi ne estas nazoreano, tio estas evidenta. Sed ĉu vi ankoraŭ estas judo?”

“Mi akceptas la Dion en mi, pri kiu Jeŝu predikis. Bedaŭrinde li mem havis du Diojn, tiun en li, kaj tiun en la sinagogaj rulaĵoj – kaj la du estis neakordigeblaj. La monstro en la rulaĵoj postulis lian morton.”

Milda kolero avertis, ke li volas malfermi novan temon. “Eleazar, vi estas, vi diras, nazoreano. Ĉu vi aprobas la falsaĵojn, kiujn la sektanoj disvastigas? Mi memoras, kiel Jeŝu kaj mi ŝercis pri la fantaziaĵoj elpensitaj de kelkaj ventkapuloj, dum li ankoraŭ vivis – ekzemple, ke li marŝas sur akvo, ke li konvertis akvon en vinon, ke li manĝigis vastan homamason per kelkaj fiŝetoj, ke li elpelis fiajn demonojn el homoj kaj en porkojn, kiuj panike kuris en lagon ...” Ŝimeon mallonge kaj senhumure ridis.

“Kompreneble mi aŭdis tiajn rakontojn,” mi respondis. “Sed estas nenia devigo kredi ilin. Mi koncentriĝas pri la bela etiko, kiun Jeŝu donis al ni.”

“Kaj la baldaŭa fino de la mondo?”

“Mi kredas, ke Jeŝu revenos en gloro konstrui la Regnon de Dio sur la Tero. Eble fizika detruo ne okazos.”

Ŝimeon duone kapjesis, kvazaŭ por diri: Nu, via kredo estas iluzia, sed vi ne estas inter la plej senesperaj de la sekto.

“Ĉu mi rajtas nun demandi vin, kion vi opinias pri Paulus?” mi demandis.

“Paulus. Kverelemulo. Devas ĉiam pravi. Insultas ĉiujn, kiuj ne centprocente konsentas kun li. Kredas, ke li havas la plej gravan taskon en la mondo konvinki ĉiujn same kredi kiel li.”

“Neniu neus, ke Paulus estas timinda oponulo, sed ĉu vi ne admiras lian forton, lian eltenemon en la plej malfacilaj situacioj? Neniu iam ajn pli suferis pro sia kredo. Kaj nun preskaŭ certe li martiriĝis en Romo.”

“Frenezuloj ofte multe suferas. Nu,” kaj la unuan fojon Ŝimeon iom ridetis, “mi ne

volas diri, ke Paulus estis frenezulo. Sed mi aŭdis sufiĉon por profunde malkonsenti kun li.”

“Pri kio?”

“Li asertis, ke Jeŝu – kaj li daŭre diris Jeŝu Mesio – donis al li, Paulus, specialan instruadon, tiel ke li pli scias pri Jeŝu ol eĉ la homoj, kiuj dum jaroj kunvivis kun mia frato.”

“Jes,” mi cedis, “li asertis, ke li estas ne malpli apostolo ol Kefas kaj la ceteraj.”

“Jes, sed li absolute ne interesiĝis pri la mirinda homo, kiu estis mia frato. La vera vivo de Jeŝu – pri tio li silentis. Li kultis ian kadavrokredon – nur per sia morto Jeŝu iĝis la Mesio, kaj tiu reviviĝinta Jeŝu estas la fonto de la tuta scio de Paulus. La belaj vortoj de la vivanta Jeŝu, la sennombraj sanigoj, la magio de lia vizio – sen intereso por Paulus. Nur la kadavro estas la temo de lia tuta predikado.”

“Kion vi opinias pri la kverelo inter Paulus kaj la jerusalemaj nazoreanoj? Ili postulis, ke kiu volas iĝi nazoreano, tiu unue iĝu judo, akceptu cirkumcidon kaj obeu la judajn manĝregulojn, kaj tiel plu. Paulus forte kontraŭis tion – li asertis, ke la malnova Leĝo de la judoj iĝis anahronismo post la morto kaj releviĝo de Jeŝu, kaj ke nejudoj tute ne devas akcepti la kondiĉojn de tiu Leĝo.”

“Mi supozas,” kaj Ŝimeon zorge elektis siajn vortojn, “ke unuapense mi konsentus kun Paulus, se mi kredus, ke estas bone esti nazoreano. Sed ĉu vi scias, kial li volis konverti kiom eble plej da gojoj?”

“Li volis porti al ili la savon, kiun Jeŝu meritis por ni ĉiuj.”

“Paulus kredis, ke nemultaj el la judoj estos inter la elektitoj de Dio – inter judoj li tre malmulte sukcesis disvastigi siajn ideojn – sed li volis, ke estu sufiĉe da sanktuloj, ke la Regno de Dio finfine venu. Do li devis varbi inter la gojoj. Sed kia

stranga koncepto – Regno de Dio, kiu akceptas nur onon de la homaro, kiu konsentas kun la ideoj de Paulus! Kio pri la afrikanoj, la barbaroj de Eŭropo, la egiptoj, la araboj kaj azianoj kaj la galatoj, kiuj neniam aŭdis pri Jeŝu aŭ eĉ pri Paulus?”

Ŝimeon elegante elbuŝigis olivkernon.

## Fruaj jaroj

Mi, Ŝimeon bar Josef, estas nun naŭdekjara kaj ĝojas, ke mi povas ankoraŭ moviĝi propraforte kaj ke ŝajnas, ke mia cerbo ankoraŭ funkcias. La malavantaĝo de tia longa vivo estas, ke nun vivas neniu konversaci-partnero, kiu memoras la mondon de mia junaĝo, kiu tiel malsimilis la nunan.

Kiam mi estis juna, estis granda templo en Jerusalemo; estis riĉa pastraro nomata sadukeoj, kaj ĉiujare venis amase judoj el la tuta mondo celebri Paskon – kaj estis oftaj ribeloj de judoj kontraŭ la jugo de Romo. Kaj venis tiuj jaroj de nedirebla buĉado, unue judoj buĉitaj de aliaj judoj, poste judoj masakritaj de romianoj. La sadukeoj estis masakritaj de naciistaj judoj, kiuj deklaris la pastrojn kunlaborantoj kun la fremdlandaj subpremantoj. La alia ĉefa skolo, la fariseoj, grandparte postvivis, sed malmultaj fariseoj restas en nia lando. La



“nazoreanoj” simile malaperis el la judaj provincoj, sed ilia nombro kreskas en aliaj partoj de la Imperio – dank’ al la agado de Paulus. Malaperis ankaŭ aliaj sektoj; mi ne lamentas pro la morto de iliaj ideoj, sed ili ja estis integra parto de la mondo konata al mi.

Mi mem postvivis, ne pro miaj eventualaj virtoj sed pro bonŝanco kaj la fakto, ke la produkto de mia laboro en Magdala, la fiŝo *muries*, estas tre populara en Romo. La fanatikuloj inter la judaj ribeluloj, apogantoj de la seninterrompa vico de “mesioj”, prezentis al mi pli grandan danĝeron ol la fremdlandaj soldatoj. Mi ne fieras, ke mi venis al interkonsento kun romia generalo, ke li ricevos parton de miaj profitoj. Oni povus nomi min malnobla, sed almenaŭ mi sukcesis resti vivanta. Estis tro da herooj, kiuj mortis sur kruco aŭ trapikitaj de glavo aŭ senkapigitaj. Kaj mi ne estis deportita al fora sklavejo, nek iĝis unu el la sennombraj malriĉaj senteraj kamparuloj, kiuj devas

serĉi iun ajn laboron en urbo ie aŭ iĝi bandito.

Nun Jerusalemo estas duondezerto, kaj rezulte de tiu horora milito la juda elito malaperis en katenoj ien en la Imperio. Mi sentas, ke mi filozofie liberigis min de juda naciismo – sed kiel mi ne sentu iom da nostalgio pri malaperinta nacio, al kiu mi vole-nevole apartenas?

=\*-\*-

Eble vi komprenis, ke kiam Eleazar vizitis min antaŭ tiom da jaroj, lia ĉefa celo estis demandi min pri la homo, kiun ni nun ĉiuj nomas Paulus. Miaj komentoj pri Paulus tiutempe estis mallongaj kaj tute ne pozitivaj. Ankoraŭ hodiaŭ me havas miksajn sentojn pri tiu sinjoro. Mi unue renkontis lin, kiam li venis al Jerusalemo (mi vizitis miajn familianojn tie) por

alfronti akuzojn, ke li misprezentas la nazorean kredon. Tuj mi vidis, ke mia frato Jakob kaj Kefas kaj la aliaj estroj de la grupo da Jeŝu-adorantoj timas Paulus. Li estis fizike ne impona, sed lia inteligento kaj antaŭ ĉio lia plenenergia rezoluteco, lia konvinkiĝo pri la propra afero kaj lia sciaro superfortis la kamparulojn kaj fiŝistojn de “La Vojo”. Li povis paroli kun grekaj intelektuloj kaj kun judaj pensuloj. Li havis ankaŭ talenton por paroli al taglaboristoj. Mi skribos pli pri tio poste, sed mi volas registri, ke mi tuj sentis antipation al tiu homo, kiun mi tiam juĝis fanatikulo; sed ke nuntempe mia juĝo pri li estas malpli akra, aŭ pli multflanka.

Kial do mi nun intencas skribi pri ĝuste tiu sama Paulus? Mi ne diros, ke mi trovas lin simpatia, sed ne eblas nei, ke li estis grava homo. Pro liaj penoj tiu miniatura movado, kiu sendube estus jam delonge forvelkinta en Jerusalemo aŭ dispelita dum la milito, nun disvastiĝas tra la tuta Imperio sub la nomo “kristanismo”. Kaj kiam mi ekzamenas liajn vortojn, foje mi trovas ilin

absolute noblaj – kaj same ofte liaj kverelemo kaj nepra pravemo forpuŝas min. Mi antaŭvidas, ke dum mi skribos, miaj sentoj daŭre ŝanceliĝos inter admiro kaj antipatio.

Same kiel Eleazar iam volis pridemandi min pri Paulus, mi dum la ĵus pasintaj jaroj provis kontakti ĉiujn, kiuj konis Paulus. Mi eĉ vizitis homojn en foraj lokoj, kaj mi kredas, ke mi legis ĉiujn el la konataj leteroj de Paulus al diversaj komunumoj, la ĉefa literaturo de la nuna kristanismo. Multon mi devos interpreti, sed mi honeste strebis esti justa al Saul bar Ŝadrah, kiun la mondo nun nomas Paulus la apostolo.

Cetere, mi ne modifis mian sintenon pri mesioj kaj naciaj obsediĝoj, eĉ se oni ofte – je mia ĉagreno – nomas min “la lasta frato de la Mesio”. Jes, mi kredas je Dio, sed ne, ke Li havas plej ŝatatajn naciojn. Kaj mi ne kredas, ke la fino de la mondo proksimas, kvankam granda plimulto de miaj samgentanoj – jes, eĉ mia nobla frato Jeŝu,

kaj same Paulus – atendas tion. Krome mi ne kredas je mesioj.

Povas esti, ke pro mia vivolonga vojaĝemo kaj miaj kontaktoj kun dekoj da popoloj, ne nur judoj kaj “grekoj”, mi perdis mian propran naciecon. Se estas tiel, mi ne bedaŭras. Mi volas esti homo, filo de Dio, ne nur ano de iu nacio. Almenaŭ tiusence mi same sentas kiel Paulus.

=\*-\*-

En Tarsos, la hejmurbo de Paulus, mi renkontis viron kun la kromnomo “Tobias la mutulo”, samaĝulon kaj konaton de Paulus – aŭ Saul, kiel li memoris la viron. Tobias, apenaŭ parolipova, tamen bonkore provizis al mi siajn tre bele skribitajn memoraĵojn pri la homo. Nun bonvolu legi la vortojn de Tobias.

=\*-\*-

Nia urbo Tarsos estas grava centro. Nur 50 paŝmilojn norde estas la ostofrostigaj pintoj de montaro; 20 paŝmilojn sude la maltrankvila Mediteraneo. Ĉirkaŭ la urbo estas multakva ebenaĵo, kie moskitoj svarmas. Tarsos havas grandan judan komunumon, sed kompreneble ni estas malplimulto kompare kun la “grekoj”, kiel ni nomas ĉiujn gojojn. Probable estas homoj el ĉiu angulo de la Imperio en Tarsos, sed ni parolas ĉiam pri “grekoj”. Ĉiukaze ni ĉiuj parolas greke, eĉ ni judoj, kiuj grandparte konas ankaŭ la aramean, kiun ni preferas nomi la hebrea. Ni ne devas suferi la terurajn intergentajn batalojn de Aleksandrio, sed ankaŭ ĉe ni estas ofte streĉitecoj, kaj estas tre konsilinde resti en la propra genta kvartalo, kiam koleraj vortoj estas interŝanĝataj inter la grupoj.

Mi bone memoras incidenton de antaŭ multaj jardekoj, kiam Saul kaj mi estis eble okjaraj. Ni estis kun eble dek aliaj samaĝaj judaj knaboj, kaj estis multe da ridado kaj puŝado kaj ŝajnaj minacoj – kiel knabetoj emas fari, se neniu plenkreskulo ĉeestas por ilin bravigi.

Senatente kien ni iras, ni subite troviĝis en fremda teritorio – kaj proksimume samnombra aro da grekaj knaboj alfrontis nin. Ili ŝajnis fizike pli grandaj ol ni, sed eble ili kredis la malon. Unue ambaŭ grupoj rigardis la alian kun aŭtenta scivolo: jam la aligentaj vestoj kaptis nian atenton. Tiam iu el niaj vicoj levis sian voĉon kaj memorigis nin “arameojn” pri la fikutimoj de grekoj. Aliflanke greka knabo kriis insultojn pri niaj strangaj vestoj kaj manĝkutimoj, kaj li faris obscenajn aludojn al niaj cirkumciditaj penisoj. Pli kaj pli da voĉoj leviĝis, kaj la etoso iĝis vere minaca. Subite greka knabo kliniĝis por enmanigi ŝtonon, kaj tuj Saul sturmis kiel kolera bovo kaj sternis lin, kriante aramee kaj greke, “Pugnoj, ne ŝtonoj!”

Aliaj grekaj knaboj sin ĵetis sur Saul, kaj tuj sekvis ĝenerala batalo – sed direndas, ke oni observis la principon de Saul, ke ŝtonoj estas malpermesitaj. La pugnobatado estis akra, kaj baldaŭ sango videblis sur multaj vizaĝoj. Sed du atkreskaj viroj en blankaj roboj aperis de ie – eble ili estis pastroj de iu greka dio – kaj ili fizike apartigis la plej violente luktantojn kaj alkriis nin ĉiujn. “Judoj, iru hejmen en paco! Grekoj, lasu ilin iri!”

Kaj tiel estis. Mi certe, kaj probable ĉiuj, estis kontentaj, ke la malbela sceno finiĝis. Ni reiris en nian kvartalon kun multaj kontuzoj, ŝvelintaj lipoj, kaj sangomakuloj, sed kun ia sento, ke ni defendis nian popolon kontraŭ malamikoj.

“Vidu,” diris Saul fiere, “mi havas pli da vundoj ol vi ĉiuj!”

Li pravis, sed kial li devis tion diri? La diro ĉagrenis nin aliajn. Jes, ni ĉiuj cedis, ke Saul malgraŭ sia malgranda staturo estas la natura ĉefo de nia grupo, kaj li



senhumure kaj bojavoĉe kaj brilokule  
insistis pri tio. Sed kial ĉiumomente emfazi  
tion?

=\*=\*=

La sinagogo estis kompreneble la loko  
de niaj diservoj, sed ankaŭ vigla komunuma  
centro kaj lernejo, kie fariseoj instruis  
legadon kaj skribadon. Mia patro hezitis  
sendi min tien lerni, ĉar dumvive min  
afliktas nekapablo normale paroli. Mi ne  
estas absolute muta: se mi vere klopodigas  
min, mi sukcesas diri vortojn, sed tiel  
mallaŭte, ke oni devas meti sian oreton  
apud mian buŝon por kompreni. Mi ne  
scias, kiom da fojoj mi provis venki tiun  
mankon, kiom da kolerlarmoj mi elverŝis,  
sed iam en mia knabaĝo mi rezignis pri  
normala parolado, kaj oni nomadis min  
Tobias la mutulo.

Tiu problemo estis mia ĉefa. Mi baldaŭ montris al ĉiuj, ke mi flue legas la Toraon kaj la aliajn sanktajn librojn. Ni ne legis la tekstojn en la originala hebrea, nek en nia propra lingvo, la aramea, sed en la “septuaginta”, la greka versio. Do tre junaj ni estis dulingvaj, ankaŭ skribe; fakte ni baldaŭ preferis skribi greke. Kaj oni konstatis, ke mi skribas rapide, bele, kaj grandparte senerare.

Saul volis esti la plej klera el ĉiuj. Ankaŭ li legis tre rapide, kvazaŭ li vorus la tekston, kaj lia komprenpovo ja superis tiun de ĉiuj samaĝuloj. Sed ankaŭ li havis mankon: lia skribado estis malbele granda, sed pli grave, li eraris en preskaŭ ĉiu vorto. Ekzemple, eĉ la propran nomon li skribis jen *Sual*, jen *Salu*, jen *Slau*, kaj foje *Saul*. Tio ege ĉagrenis lin, sed eĉ multe da ekzercado ne forigis la problemon.

Tiuj fizikaj mankoj, kiujn dumtempe niaj samaĝuloj priridis, ligis min al Saul. Okazis de tempo al tempo, ke li volas ion skribi, do li diktis al mi. Se mi volis anonci

ion al la tuta grupo, mi skribis kaj Saul transdonis buŝe. Kaj ni du evoluigis reciprokan interkomprenon: ofte ni konversaciis pli-malpli geste, kaj foje mi devis skribi unu-du vortojn. Iu elpensis kruelan ŝercon, ke Saul kaj Tobias estas ĝemeloj, unu senmana kaj la alia senlanga. Sed la akra inteligento de Saul en siaj respondoj kaj demandoj al la instruisto baldaŭ silentigis la maliculojn.

Kompreneble la lernado en la sinagogo estis grava parto de nia vivo, sed same grava estis trejnado por nia estonta laboro. Mia patro estis skribisto. Antaŭ ĉio li surpaperis decidajn de tribunaloj, geedziĝatestojn, kaj kontraktojn pri vendoj de domoj. Mi estis kontenta lerni tiun metion, kaj li fieris pri mia skribolerto.

Saul lernis tute alian metion. Lia patro Ŝadrah estis bonhava komercisto, kiu krome specialiĝis pri kudrado kaj vendado de tendoj faritaj el la peltoj de longaharaj nigraj kaproj. Estas vera arto kudri tiel, ke la tendo ne tralasu pluvakvon,

sed Saul rapide lernis. Tia humila manlaboro tamen sufiĉe bone enspezis. Patro kaj filo starigis du tablojn ie en la komerca strato. Sur unu ili sternis la jam pretajn objektojn, kaj sur la alia ili ekkudris pluajn. La patro produktis ĉefe tendojn, sed Saul ŝatis variigi la laboron, farante vintrajn vestojn kaj litotukojn. Iliaj produktoj bone vendiĝis, kaj la familio estis inter la plej respektataj en la juda kvartalo. Cetere, mi iam demandis Saul, ĉu ne embarasas lin labori per la manoj. Homoj el lia socia klaso kutime evitas manlaborojn. Saul respondis, ke li ne hontas, kaj li aldonis, ke per vendado li konatiĝis kun multaj diversnaciaj “grekoj”, kaj li akiris komence “internacian” vidpunkton.

Mi ne menciis, ke ankaŭ Ŝadrah la patro estis fortvola homo, kaj li kaj Saul foje konfliktis. La patrino Rebeka estis tre milda homo, ĉe kiu Saul ĉiam trovis apogon.

Alia kampo, sur kiu Saul aspiris elstari, estis tiu de kurado. Li havis ne longajn sed fortajn krurojn, per kiuj li kutimis marŝi tre

rapide, kaj ĉar lia spirpovo estis bona, estis kompreneble, ke li ŝatas kuri. Samaĝulo Jonatan, multrilate rivalo, aŭdis ian fanfaronajon de Saul kaj mokis lin, kaj do estis aranĝita konkurso inter la du. Granda grupo da junuloj (ni estis tiam eble dekdujaraj) ariĝis por rigardi. Saul kaj Jonatan devis kuri de unu arbo al alia, eble kvincent paŝojn for, kaj revenen. Jonatan, altkreska svelta junulo, tuj saltis antaŭen kaj facile venkis, probable per dek paŝoj. Sed Saul, alveninte ĉe la celo, defiis Jonatan al ankoraŭ alia konkurso – fakte ripeto de la ĵusa. Jonatan ne tre emis, sed ni aliaj apogis Saul, kaj la du ree ekkuris. Jonatan baldaŭ estis kvin paŝojn antaŭ Saul, sed iom post iom liaj longaj kruroj laciĝis, dum la fortaj O-kruroj de Saul daŭrigis samritme. Kiam Jonatan atingis la foran arbon, li estis nur du paŝojn antaŭ Saul, kaj provis per lasta fortostreĉo lasi la oponulon malantaŭ si. Li atingis kvinpaŝan avantaĝon, sed dum la lasta paŝcento Saul senkompate alproksimiĝis kaj fine preterkuris Jonatan. Li gajnis per tri paŝoj.

Sed okazis io, kio metis finon al ĉiu eventuala aspiro de Saul esti atleto. Mi jam menciis, ke moskitoj pululas ĉirkaŭ Tarsos. Kelkaj homoj malsaniĝis de tio, kaj Saul estis inter ili. Oni nomas tiun malsanon laŭ la malbona aero, “malaria”.

Saul fieris, ke li estas ja judo, sed ankaŭ civitano de Romo. Jonatan lia rivalo moki diris, ke tio okazis nur pro tio, ke la avo de Saul estis iam sklavo. Kiam la avo ricevis sian liberiĝon, li aŭtomate iĝis romia civitano, kaj lia filo Ŝadraĥ kaj poste lia nepo Saul heredis tion. Saul turnis vipan langon sur ĉiun, kiu pridubis lian duoblan identecon.

Kiam mi estis deksepjara, mia patro aranĝis fianĉiĝon al Raĥel, la unua filino de alia skribisto. Nek ŝi nek mi entuziasmis; mia muteco devis esti ŝoko por ŝi. Kaj Raĥel, kun sia longa pinta nazo, iomete ĝiba dorso, kaj trolarĝaj koksoj, certe ne estis belulino. Unu jaron post nia geedziĝo ŝi naskis infanon, kiu mortis kelkajn horojn poste. La postan jaron ŝi refoje gravediĝis,

sed la bebo estis mortnaskita, kaj Raĥel mem preskaŭ pereis. Ŝi timis, ke post tiu dua fiasko mi forsendos ŝin, sed intertempe mi estis enamiĝinta al tiu trankvile inteligenta virino, kaj ŝajnas, ke ŝia dankemo ŝanĝiĝis en amon al mi. Ni zorge evitis gravedigi ŝin. Ankoraŭ hodiaŭ ni feliĉe kunvivas.

Tiurilate la sorto de Saul tre diferencis de mia. Iom post mia edziĝo la pasia juna viro, kune kun pluraj aliaj, dediĉis sin grandparte al legado de grekaj klasikaĵoj – *Iliado* kaj *Odiseado*, Platono, kaj diversaj religiaj grupetoj. Mi havis la impreson ke, se Saul ne iom hontus pri sia malgranda korpo, li volonte partoprenus en la nudkorpa gimnastikado kaj sportado de la grekoj. Ŝadraĥ forte kontraŭis tiun “grekumadon”. Eble parte pro spitado Saul akompanadis kamaradojn al bordeloj.

Nia socio kondamnas virinon, kiu sin montras sekse promiskua, kaj teorie grimacas al viroj kun tia eco. Sed se temas pri junuloj nek fianĉiĝintaj nek edziĝintaj,

oni fermas ambaŭ okulojn kaj parolas pri la neceso “spertiĝi”. Kiel mi skribis, Saul ne estis la sola “spertanto”, sed lia reago post kelkaj monatoj da vizitoj al bordeloj estis, mi diru, “sauleca”. Iam li koitis kun knabino, kiu estis virgulino kaj menstruonta – sango kovris kaj ŝin kaj Saulon. Lia honto kaj naŭziĝo estis tiel fortaj, ke li komencis sin vipi, kiam lia korpo volis lin puŝi al bordelo. Ĉe Saul ĉiu direktoŝanĝo estis drasta – lia plezuramo subite cedis al religia rigoro.

Mi nomus tion la unua forta religia sperto de Saul. Li konvinkiĝis, ke ne nur li, sed ĉiuj homoj, estas pekemaj, kaj ke la detruo de la mondo, la ĉiama fono de religiaj diskutoj, estas ne nur meritita sed neevitebla. Mi naive skribis *Kial ni estas pekemaj?* Saul respondis, “Ni scias, ke niaj prapatroj per sia malobeo al Dio por ĉiam venenis nian rason, sed la mondo mem daŭre tentas nin. Ni ne povas atingi Dion, ĉar inter Dio kaj ni estas armeo de malicaj demonoj, kiuj ege influas nian agadon.”



Mi volis fari demandon, sed Saul daŭrigis nehaltigeble, “Mi scias, ke estas multaj malbonaj homoj inter ni judoj kaj eĉ pli inter la gojoj, sed ili estus malpli fiaj, se la demonoj ne konstante igus ilin peki. Kaj la demonoj respondecas pri tertremoj, pri senpluvaj jaroj, pri epidemioj, pri la larmoj de vidvinoj kaj orfoj, kaj pri militoj. Dio estas bona, sed ofte tre malproksima de ni.”

*Kion fari? Mi lipumis.*

“Nia sola protekto estas obei Dion kaj defendi nian fidon, la fidon troveblan en niaj sanktaj libroj. Eĉ se necese per milito kontraŭ la malamikoj de tiu fido, ĉar ilin pelas la malbonaj demonoj.”

Iam en tiu periodo Saul konfidis al mi, ke li ofte havas tre vervajn sonĝojn, inter ili multajn koŝmarojn. Li foje vidis timigajn bildojn de tertremoj kaj gigantaj marondoj, kiuj dronas ĉion sur la tero. Por li la fino de la mondo estis pli ol nura esprimo. Kaj foje lia malsano rezultigis turmentajn sonĝojn.

La energio kaj ambicio de Saul poste direktiĝis al eminenteco en la severa skolo de la fariseoj. Ŝadrah, mem rigora fariseo, ekspluatis tiun novan sintenon por sendi Saul al Jerusalemo studi ĉe la plej renoma klerulo de la juda mondo, Gamaliel. Per multe da studado Saul akiris reputacion, sed eĉ pli per la asketeco de sia vivo kaj fideleco al ĉiuj reguloj. Saul deklaris, ke li neniam edziĝos, sed dediĉos sin al serĉo al Dio kaj Lia volo, kvankam fariseoj kutime edziĝas same kiel aliaj viroj.

Kiam Saul revenis dudekdujara al Tarso, li estis agnoskata en nia parto de Azio kiel inter la plej promesoplenaj defendantoj de nia fido. Li estis severa al si mem – la vipo feroce venkis liajn karnajn dezirojn – kaj li estis preta esti severa al la malamikoj de nia antikva fido.

=\*==\*

Iun tagon Saul vizitis min kaj Raĥel kaj informis nin, ke baldaŭ li foriros kiel delegito de la sinagogo de Tarsos laŭ peto de la pastraro en Jerusalemo. Li estos la plej juna el la trivira grupo, kaj li entuziasmis pri la tasko.

*Kien? Mi lipumis.*

“Al Jerusalemo, kie pestoporta nova sekto minacas nian fidon. Ili sin nomas nazoreanoj. Ili adoras iun Jeŝuon, krucumitan de la romianoj antaŭ kelkaj jaroj – ili diras, ke Jeŝu estis la Mesio. Mesio! Ni scias, ke Dio malbenas tiujn, kiuj mortis sur kruco! Kaj li estis malklera ĉarpentisto, kies adeptoj estas grandparte fiŝistoj. Kia blasfemo! Jes, ankaŭ ni kredas, ke la Mesio venos, kiam la mondo finiĝos – sed tiuj kruduloj asertas, ke la Mesio jam venis! La centro de la sekto estas en Jerusalemo, kaj ili laŭdire havas kelkajn anojn en Galileo, en Samario, en Damasko, kaj eĉ en nia Cilicio. Tion ni devas haltigi,” Saul diris kun rezoluta mieno. “Je mia naŭzo mi aŭdis, ke du el miaj parencoj,

Andronicus kaj Junia, aliĝis al tiu hontinda grupo.”

Li estis forironta, sed turnis sin kun esprimo de naŭziĝo: “Vi ne povus imagi, kion tiuj nazoreanoj uzas kiel simbolon de sia kredo. Krucon! La ilo de hontinda morto, kaj ili fiere nomas ĝin sia identigilo! Imagu, ke nia simbolo estus ŝtono aŭ lanco aŭ glavo ... Jam pro tia abomeninda gusto ili meritas punon! Jes, ili meritas morton. Dio elkraĉas ĉiun, kiu mortas sur arbo – tio estas en la Sankta Skribo.”

Nu, mi estas kompare kun Saul flegma homo. Mi ne emas mortigi aliajn, kaj mi demandis lin, ĉu lia diro ne estas drasta troigo.

“Neniel!” li iom kolere respondis. “Ni devas imiti la agadon de Finehas, filo de Eleazar.”

“Pardonu, mi forgesis, kion faris Finehas,” mi skribis.

“Tobias, hontu, ke vi malmulte konas la Sanktan Skribon. Nu, en la tagoj, kiam Izraelo loĝis en Ŝitim, multaj izraelidoj pekis per adorado de falsaj dioj. La Eternulo ekflamis pro kolero kaj planis ekstermi la izraelidojn. Sed Fineñas, mem pastro, mortigis unu el la plej grandaj pekuloj kaj lian midjanan edzinon, kaj forturnis la koleron de la Eternulo. Tion ni devas nun fari al tiuj nazoreanoj, kiuj povus kaŭzi, ke la kolero de Dio falu sur nin.”

Li iomete paŭzis, tiam aldonis: “Mia majstro Gamaliel konsilas paciencon rilate al tiuj nazoreanoj. Li diris, ke se ili estas senvaloraj herezuloj, Dio mem malaperigos ilin. Sed pri tio Gamaliel eraras. Dio atendas, ke ni mem ‘malaperigu’ tiajn homojn.”

Severa logiko, sed mi diris nenion, ĉar mi ne volis fremdigi Saul. Li aldonis, ke necesas gardi kontraŭ ĉia rompo de eĉ la plej negrava regulo de nia kredo. Saul ja estis konvinkita fariseo.

Alia diro, kiun mi neniam forgesos, estis, ke ekde kiam li aŭdis pri la sekto de la nazoreanoj, la figuro de Jeŝu, ilia falsa “mesio”, hantas liajn songôjn. Tio plifortigis lian rezolutecon detrui la sekton.

Saul kaj liaj du pliaĝaj kolegoj estis for dum kelkaj semajnoj. Kiam ili revenis, Saul aspektis nervoza kaj streĉita. Li ne volis multon diri pri la ekspedicio, sed ni komprenis tiom, ke la tri viroj iris al la judaj aŭtoritatuloj en urbetoj kaj vilaĝoj ĉe la marbordo kaj postulis en la nomo de la aŭtoritatuloj de Jerusalemo, ke oni procesu kontraŭ la sektanoj. En du-tri vilaĝoj la lokaj homoj, instigite grandparte de la flama oratorado de Saul, tiel koleris, ke ili mortigis la estron de la nazoreanoj.

Tio devis esti ia triumfo por Saul, sed videble li ne ĝojis. Li akre asertis, ke li faras ĉion por protekti nian judan fidon, sed plue li ne volis diskuti la aferon. Li malofte vizitis nin aŭ aliajn konatojn, sed laboris kiel kutime en la komerca strato, studis la sanktajn tekstojn, kaj laŭeble evitis homojn.

Najbaro raportis, ke li kelkfoje aŭdis la susuradon de vipo, kaj la gruntojn de Saul, kiam la leda finaĵo mordis lian dorsan karnon.

Tiam mortis Ŝadraĥ. Patro kaj filo neniam estis kore proksimaj – ili tro similis unu la alian. Dum kelka tempo Saul sin dediĉis al komercaj aferoj kaj vivtenis Rebeka, la patrinon. Sed tiu mildulino apenaŭ postvivis la edzon. Saul estis senparenca, kaj eble tio plifortigis lian ardon por religiaj taskoj.

Iom poste okazis ankoraŭ alia ekspedicio kontraŭ la herezaj nazoreanoj. La samaj tri viroj iris refoje al Jerusalemo. La subpremado eblis nur pro tio, ke la nazoreanoj estis senescepte judoj; se ili estintus grekoj, Saul kaj liaj kunuloj povintus nenion atingi. La romia potenco permesas al ni judoj ŝtonumi aliajn judojn pro religiaj kialoj, sed politikajn ekzekutojn ili ne permesas, kaj ataki “grekojn” estas “politiko”.

Iun tagon Saul ĉeestis, kiam estis tumulto kontraŭ iu nazoreano kun la nomo Stefano. Ŝajnas, ke Stefano eŭforiis kaj elokvente predikis favore al la mortinta Dio de la nazoreanoj – li eĉ publike diris, ke Jeŝu estis ne nur mesio, do reĝo de la judoj, sed Dio mem. Post ĥaosa proceso grupo da ekscititaj viroj decidis mortigi lin, sciante, ke la romianoj ne malpermesus. Ili trenis la apenaŭ luktantan viron preter la urbopordego ĝis loko, kie troviĝis multe da ŝtonoj. Ili ĵetis Stefanon teren kaj komencis priĵeti lin per ŝtonoj. Estis varma tago, kaj kelkaj demetis siajn robojn. Saul, kiu ĉiam malaprobas malordon, enbrakigis la vestojn kaj tenis ilin, dum ŝtonoj pluvis sur la kuŝanton. La unuaj ŝtonoj evidente donis doloron, sed ne mortigis la spasme moviĝantan Stefanon, kiu provis protekti sian kapon per la brakoj. Iu viro trovis pezan rokon kaj ĵetegis ĝin rekte sur la kapon. Oni aŭdis krakon de kraniaj ostoj, kaj la viktimo laŭtege ĝemis. Aliaj viroj simile trafis la kapon, kaj baldaŭ Stefano tordiĝis en flakoj da sango, nevidante el kiu



direkto venas la ŝtonoj, kaj fine li kuŝis senmove kaj silenta. La tasko estis finita.

Saul baldaŭ eksciis, ke tiu Stefano ne estis loka judo, sed grekparola judo de la diasporo, kaj estis aliaj tiaj diasporuloj tiutempe en Jerusalemo, kiuj simile al Stefano nomis Jeŝuon Dio kaj estis multe pli emociaj en sia adorado ol normalaj judoj. Antaŭ ol la templaj “policistoj”, el kiuj Saul estis la plej severa, povis kapti tiujn “grekojn”, ili fuĝis el Jerusalemo, probable al Damasko. Iom surprizis Saul, ke la jerusalemaj nazoreanoj, antaŭ ĉiuj Jakob (frato de la mortinta Jeŝu) kaj Kefas kaj Jonatan, ne tre bedaŭras la malaperon de la tro ekstazaj diasporuloj, ĉar ili nepre volis havi kiel eble plej bonajn rilatojn kun lokaj judoj kaj daŭre kulti en la Templo. Sed Saul suspektis kaj gvatis ilin, atendente ŝancon aresti.

Baldaŭ oni parolis pri Saul kiel “*la persekutanto de nazoreanoj*”. Li fieris pri tiu titolo, sed mi rimarkis, ke kiam li revenis al Tarsos, li mem estas daŭre

streĉita. Iun tre varman tagon post lia reveno el tiu dua ekspedicio mi vidis lin proksime al nia dometo, kaj mi geste invitis lin viziti nin kaj ion trinki. Li hezitis, sed tiam faris malakceptan geston, kaj senvorte marŝis pluen. Dum tiuj kelkaj sekundoj mi pensis, ke Saul proksimiĝas al ia krizo, tiel morna estis lia mieno. La postan matenon mi vidis lin marŝanta sur siaj fortaj kruroj apud azeno, kiu portis lian bagaĝon, akompanate de du kolegoj kun siaj azenoj. Mi observis la konversacion de la tri, kaj rimarkis, ke Saul vorte instigas la aliajn du plenumi sian sanktan taskon. Aŭ ĉu Saul devis sin konvinki?

Saul ne permesis al sia persona krizo dampi lian ardon pri la kampanjo kontraŭ la sektanoj. Li partoprenis en ses ekspedicioj, kaj ĉe la lasta li mem estis la estro. Tiu lasta, kiu celis Damaskon, estis mistera afero, pri kiu mi ne povas multon raporti, sed evidente ĝi ege gravis en la vivo de Saul.

En kelkaj vilaĝoj la nazoreanoj parolis, ne ĉiam konsentante kun siaj samsektanoj, pri sia kredo kaj sia adoro al la ekzekutita Jeŝu. Jeŝu estis laŭaserte grandskala saniganto de homoj kun korpaj kaj mensaj malsanoj. Li estis laŭdire ĝenerale pacifisto, kiu konsilis turni la maldekstran vangon al homoj, kiuj batis vian dekstran. Li ignoris multajn regulojn pri manĝado, kion oni rajtas manĝi kaj kun kiu; viroj kaj virinoj de lia sekvantaro seninhibicie kune manĝis. Li stimulis infanojn fari demandojn, se ili ion ne komprenis. Li ne rekte atakis la Templon en Jerusalemo, la centron de la masive prospera komerco per oferataj bestoj – eĉ pli inside, li ignoris ĝin, kvazaŭ ĝi ne plu gravus, kio estus forta bato kontraŭ la pastraro, kiu riĉiĝas pro la rolo de tiu Templo.

La nazoreanoj kredis, ke Jeŝu estas la Mesio, kiu sin oferis por la tuta popolo de Dio kaj eĉ por la gojoj, kvankam la gojoj estis nur marĝenuloj por li. Post sia morto li releviĝis – lia tombo estis malplena. Mi ne ĉeestis, sed mi devas dubi la verecon de tiu

rakonto: la romianoj ne permesis enterigon al krucumitoj – ili volis, ke la kadavro putru sur la kruco kaj estu vorita de birdoj kaj sovaĝaj bestoj. Sed nu, jen la rakonto. Tiam multaj homoj raportis, ke Jeŝu aperis antaŭ ili en gloro luma sed rekonebla formo. La nazoreanoj kredis, ke baldaŭ Jeŝu revenos al la tero, detruos la fortojn de malbono, kaj enkondukos la Regnon de Dio.

Saul aŭskultis tiujn mirige similajn raportojn, kaj vole-nevole trovis, ke la ideoj de la nazoreanoj kaj kolerigas kaj iel ekaltiras ankaŭ lin. Tio kompreneble tre konfuzis lian rolon, kaj lia sola maniero daŭrigi la laboron de persekutanto estis agi pli kaj pli severe kontraŭ la mildaj sektanoj. Li ne plu instigis la lokajn judojn ŝtonumi la nazoreanojn, sed jes aresti kaj bastonadi. Antaŭ ol forlasi vizititan vilaĝon li kaj liaj kolegoj minacis pli drastajn punojn, se la sektanoj provos disvastigi sian kredon. Sed laŭ raportoj tiuj minacoj atingis preskaŭ nenion, kaj tio aldonis al la interna kolero kaj konfuzo de Saul.

Mi, Tobias, estis vizite en Jerusalemo por celebri Paskon kaj vidis la ekspedicion ekiri al Damasko sub gvidado de Saul. La ekspedicianoj havis leterojn, kiuj permesos al ili aresti nazoreanojn en Damasko kaj preni ilin katenitajn al Jerusalemo por proceso. Saul portis blankan robon kun nigraj strioj kaj blanka kapuĉo, kaj tenis mane longan bastonon. La du kunuloj estis pliagaj, sed evidente cedis estrecon de la grupo al la juna viro, la fajrokula predikanto. Kiel kutime, ĉiu viro marŝis apud azeno, kiu luktis sub peza bagaĝo, inkluzive akvobotelojn. Jes, akvon ili bezonos sur la seka vojo al Damasko sub la suno. Mi rigardis, dum la fortaj kruroj de mia amiko Saul trenis la du aliajn al plirapida marŝritmo, ol ili volis. Kaj mi pensis: nur tri viroj, sed ili povas alporti multe da doloro al tiuj kompatindaj sektanoj. Mi ja estis multe pli modera pri tiaj temoj ol mia amiko.

Saul ne atingis Damaskon laŭplane, almenaŭ ne kiel persekutanto de la sektanoj. Mi neniam plu vidis Saul, kaj

kvankam la eventoj okazintaj apud kaj en Damasko evidente estis turnopunkto en la tuta vivo de mia iama amiko, mi havas nenian ideon, kiaj estis tiuj eventoj. Ĉu malario trafis lin en akuta formo? Kaj poste Saul restis dum kelkaj jaroj en Arabio, do ĉiu kontakto inter ni du ĉesis. Mi estus volonte korespondinta kun li, sed mi sciis, ke pro la embarasa skribproblemo li ne respondus, krom se li povus dikti al skribanto.

## Unuaj misioj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Paulus sin prezentas**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



## La unua vojaĝo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Galatio**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## La dua vojaĝo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **La tria vojaĝo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Paulus kontraŭ Jakob**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **La justulo**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **La morto de Paulus**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

## **Kaj hodiaŭ?**

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono, sed nur en la plena verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# Kolofono

**Titolo:** Paulus fondinto

**Aŭtoro:** Trevor Steele

**Serio Stafeto** n-ro 43

**Kovrila bildo:** pentraĵo de Abraham  
Bloemaert (1564–1651)

**ISBN de la papera eldono:** 978 907706  
666 9

**UDK:** 82.3.892

**NUR:** 300

**Leĝa depono de la papera eldono:**  
D/2020/2924/2

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060

Antwerpen

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2020 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi bitlibro estas senpaga provaĵo kaj  
enhavas nur kelkajn ĉapitrojn de la  
originala verko. Ĝi rajtas esti libere kopiata.

# La serio „Stafeto”

En la serio „Stafeto” aperis:

1. Ĉu rakonti novele? (Johán Valano)  
*(bindita versio elĉerpita, ankoraŭ havebla kiel bitlibro)*
2. Sub la signo de socia muzo (William Auld kaj Stefan Maul, red.)
3. Kazinski venas tro malfrue (Deck Dorval)
4. Beletro, sed ne el katedro (Gaston Waringhien)
5. Murdo en Esperantujo (Daniel Moirand)  
*(bindita versio elĉerpita, ankoraux havebla kiel bitlibro)*
6. Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas (Manjo Austin)
7. Nigra magio (Deck Dorval kaj Christian Declerck)
8. Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ (Adriaan Roland Holst)

9. Oktavia (Seneko)
10. Kromosomoj (Lorjak) („*Baza verkisto*” )
11. 1887 kaj la sekvo (Gaston Waringhien)
12. Dolçe amare (Emile Van Damme)
13. Urd Hadda murdita! (Deck Dorval)
14. Meznokto metropola (Krys Ungar)  
(„*Baza libro*” )
15. Ŝirpecoj (Christian Declerck)
16. Vojaĝoj kaj aliaj poemoj (Edwin de Kock) („*Baza verkisto*” )
17. Kanto pri minotaŭro (Gerrit Berveling)
18. Plena poemaro (Eŭgeno Miĥalski)  
(„*Baza libro*” )
19. El sisma zono (Mikaelo Giŝpling)  
(„*Baza libro*” )
20. Tri rakontoj pri la Miljara Paco (John Francis) („*Baza verkisto*” )
21. Sur Parnaso (Timothy Brian Carr)
22. Konto de l' vivo (Paul Gubbins)
23. La ŝtona urbo (Anna Löwenstein)
24. Kapturnoj (Higinio García)
25. Simptomoj (Goncalo Neves)
26. La Bato (Lena Karpunina)
27. Sagao de Njal (Nekonata aŭtoro;  
tradukis Baldur Ragnarsson) („*Elstara*” )

verko" )

28. Tie, ĉi tie (Mikaelo Giŝpling) („*Baza verkisto*” )

29. Dormanta Hejmaro (Manashi Dasgupta; el la bengala tradukis Probal Dasgupto)

30. Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj (Sen Rodin)

31. Neokazinta amo (Lena Karpunina)

32. Sub fremdaj ĉieloj (Edwin de Kock)

33. Morto de artisto (Anna Löwenstein)

34. Kvazaŭ ĉio dependus de mi (Trevor Steele)

35. Flugi kun kakatuoj (Trevor Steele)

36. Paradizo stelita (Trevor Steele)

37. Konvinka kamuflaĵo (Trevor Steele)

38. Dio ne havas eklezion (Trevor Steele)

39. Amo inter ruinoj (Trevor Steele)

40. La fotoalbumo fermigxas (Trevor Steele)

41. La konflikto de la epokoj (Edwin de Kock) („*Baza verkisto*” )

42. Kvin kverkoj kaj la sekvo (Christian Declerck)

43. Paulus fondinto (Trevor Steele)

44. La sangoruĝa flago (Trevor Steele)

## **Notoj**

- *Baza libro*: baza, nepre leginda kaj legenda libro (laŭ William Auld).
- *Baza verkisto*: aŭtoro aparte rekomendita de William Auld.
- *Elstara verko*: verko kiu apartenas laŭ la Nobel-komitato al la 100 plej bonaj iam verkitaj.